



ELDONO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO (REU)
№ 107, Septembro 2019



Venis la aŭtuno – la periodo, kiam oni rikoltas, kaj ankaŭ pritaksas la rikolton de la esperantista somera agado. Do, la rezultoj de la somero konsistigas gravan parton de tiu ĉi numero de la revuo – nu, fin-fine ĝi ricevis la bonordan nomon kaj ne plu estas simpla “bulteno”! La nomo estis naskita en longaj turmentoj, kaj ĝi estas rezulto de ardaĵaj pridiskutoj inter membroj de REU kaj ankaŭ de esperantistoj, kiuj ne membras en la asocio. Do, estu ĝi nun ponto inter ĉiuj esperantistoj de nia lando kaj ankaŭ inter la nuna tempo kaj la estonto!

Sed la vivo daŭras, kaj oni vidos en la revuo ankaŭ materialojn pri novaj agadoj kaj projektoj. Tio estas speciale ĝojiga – nia movado tamen ja moviĝas!

Estraro de REU

Dankesprimo al Esperanto-aktivuloj

La Estraro de REU esprimas dankon pro elstara laboro por Esperanto al la sekvaj rusiaj aktivuloj kaj kluboj, menciitaj en la raportoj pri regiona agado, ricevitaj de la regionaj kunordigantoj de REU en la regionoj Fora Oriento, Norda Kaŭkazio, Nord-Oriento kaj Uralo:

- 1/ al **Mikaelo Bronŝtejn** (Nord-Okcidento) pro elstara literatura agado kaj klerigaj agadvojaĝoj kaj koncertoj enlande kaj eksterlande;
- 2/ al **Tihvina Esperanto-Klubo** (Nord-Okcidento) pro modela kaj konkorda kluba agado, originala maniero teame popularigi Esperanton dum urbaj intelektaj ludoj kaj organizado de la 4-a renkontiĝo «Tihvinaj Esperanto-Metiejoj»;
- 3/ al **Aleksandr Korĵenkov** kaj **Halina Gorecka** (Nord-Okcidento) pro verkado kaj eldono de novaj libroj («*Nia diligenta kolegaro: Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj*» kaj «*Baza literatura krestomatia*»), laboro pri interretaj eldonaĵoj «*La Balta Ondo*» kaj «*La Ondo de Esperanto*» kaj podkasto «*La Radio Esperanto*»;
- 4/ al **Boris Kondratjev** kaj **Aleksandr Osokin** (Nord-Okcidento) pro laboro super Esperanto-Rusa kaj Rusa-Esperanta reta vortaro;
- 5/ al **Kirill Novičenko** (Nord-Okcidento) pro reprezento de Rusio en TEJO, internacia Esperanto-aktivado kaj kunordigo de tradukteamo en VK;
- 6/ al **Georgij Kevorkjanc** (Nord-Okcidento) pro konstantaj kontribuoj al Esperanto-Vikipedio, famigantaj Rusion kaj rusian Esperanto-movadon;
- 7/ al **Vjaĉeslav Ivanov** (Nord-Okcidento) pro okazigo de la 12-a Lingva Festivalo kun prezentadoj de Esperanto;
- 8/ al **Raja Kudrjavceva** (Uralo) pro iniciato kaj gvidado de la tutlanda projekto «*Decembra poezia marŝo de esperantistoj*» kaj pro okazigo de *Lingvaj Trejnadoj* kaj organizado de aktivigaj projektoj en la dissendolisto

RUSIA ESPERANTISTA UNIO

РОССИЙСКИЙ СОЮЗ ЭСПЕРАНТИСТОВ

Koran dankon!

Al regionaj kunordigantoj
Jevgenij **Bojĉin** (Fora Oriento), Abduraĥman **Junusov**
(Norda Kaŭkazio), Andrej **Rjazancev** (Nord-Okcidento) kaj
Pavel **Veselov** (Uralo) pro senditaj regionaj raportoj,
kaj al ĉiuj ruslandaj Esperanto-aktivuloj,
raportintaj pri sia agado
al la 30-a REU-Konferenco,
okazinta la 17-18-an de julio en Tihvin

Nome de la REU-estraro:
 Aleksandr Lebedev
prezidanto

de sia regiono;

9/ al **Vladimir Opletajev** (Uralo) pro verko kaj eldono de la legolibro «*Postkursa legaĵo*» kaj aŭtora kurso de Esperanto «*Facetoj*» kaj pro okazigo de *Lingvaj Trejnadoj* kaj organizado de aktivigaj projektoj en la dissendolisto de sia regiono;

10/ al **Ludmila Jerofejeva** (Uralo) pro rekunigo de Esperanto-klubo «*Renaskiĝo*» en Niĵnij Tagil;

11/ al **Pavel Veselov** (Uralo) pro la regiona paĝaro «*Ural-Siberia esperantista movado*», gvido de Ural-Siberia esperantista dissendolisto kaj pro la plej detala kaj informplena raporto pri regiona agado dum julio 2017 – julio 2019;

12/ al **uralaj esperantistoj** pro la plej aktiva partopreno en la internacia lega projekto «*Esperanto-sumoo*»;

13/ al **Jevgenij Bojĉin** (Fora Oriento) pro la plej aktiva laboro por popularigo de Esperanto per prelegoj kaj ekspozicioj;

14/ al **Abdurahman Junusov** (Norda Kaŭkazio) pro stabila laboro pri popularigo kaj instruado de Esperanto en la regiono;

15/ al **Alan Bigulov** (Norda Kaŭkazio) pro popularigo de Esperanto-lernado kaj la lingvo Esperanto en amaskomunikiloj;

16/ al **ĉiuj esperantistaj kolektivoj (Centro, Nord-Okcidento, Siberio, Uralo, Volgio)**, organizintaj akcepton de la franca esperantistino Françoise Noireau dum ŝia turneo tra Rusio;

17/ al **ĉiuj rusiaj esperantistoj**, kontribuintaj al la tutlanda projekto «*Decembra poezia marŝo de esperantistoj*»;

18/ al **Jevgenij Bojĉin** (Fora Oriento), **Abdurahman Junusov** (Norda Kaŭkazio), **Andrej Rjazancev** (Nord-Okcidento) kaj **Pavel Veselov** (Uralo) pro senditaj raportoj, surbaze de kiuj estis farita tiu ĉi danklisto; al **ĉiuj ruslandaj Esperanto-aktivuloj**, raportintaj pri sia agado al la 30-a REU-Konferenco, okazinta la 17–18-an de julio en Tiĥvin.

REU-Estraro
31.08.2019

Aranĝoj

Miaj impresoj pri TEMoj-2019



Somero estas feliĉa tempo de vojaĝoj. Ankaŭ al mi ĝi donacis ĉi-jare preskaŭ dusemajnan restadon en Esperantujo: dum unu semajno mi povis partopreni TEMojn en Tiĥvino, dum la alia – viziti tre ŝatatan de mi Sankt-Peterburgon.

TEMoj (Tiĥvinaj Esperanto-Metiejoj) estas tradicia renkontiĝo de esperantistoj, okazanta en la urbo Tiĥvino unufoje en ĉiu kvinjaro. Mi povas fiere diri, ke mi partoprenis ĉiujn TEMojn, kiuj ĝis nun okazis, ĉar mi ŝatas tiun aranĝon. Mi ĉiam admiras geamikojn el Tiĥvina Esperanto-klubo, kiuj kapablas kaj bone labori, kaj bele ripozi. Ili estas gastemaj, senavaraj kaj talentaj, modele organizas siajn somerajn renkontiĝojn kaj scipovas ĝojigi, regali, interesigi ĉiujn, venintajn gaste. Kaj ĉiufoje dum mia partopreno

en TEMoj mi havas la percepton, ke mi trafis en iun belan familian feston! Mi certas, ke tiaj ŝatantoj kaj konstantaj partoprenantoj, kiel mi, multas. Sed mi rimarkis, ke de jaro al jaro amikoj de TEMoj plimultiĝas, kaj ĉi-somere estis jam 83 partoprenantoj el 19 diversaj urboj kaj lokoj.

Se vi demandus min, kiujn asociojn mi havas lige kun la vorto “TEMoj”, mi povus diri al vi, ke por mi unue TEMoj asociiĝas kun la lago Caricino, ĉirkaŭita de arbaro, riĉa je beroj, kaj kun la trankvileco de la norda naturo, kvazaŭ “disverŝita” en la aero. Jes, ĉe Caricina lago situas la bazejo, kiu estas kutima teritorio de loĝado de TEManoj.

Kaj certe la aranĝo asociiĝas por mi kun la festado de vica duonjubiloo aŭ bela jubileo de nia Bruna Ŝtono – elstara rusia esperantisto Mikaelo Bronŝtejn, kaj ankaŭ kun nepra multego da mirindaj koncertoj en Esperanto kaj ne nur, kun interesege prelegoj kaj prezentaĵoj, kun nepra vizito de ĉarma domo-muzeo de komponisto Rimskij-Korsakov kaj agrabla promenado al kaj en teritorio de la loka vizitinda vidindaĵo – Tiĥvina monakejo. Pri ĉio tio mi rememoras kaj jam tion antaŭatendas, celante vojaĝon al novaj TEMoj.

Ĉar estas nereale enŝovi en la prokrustan liton de la artikolo la maron de miaj impresoj kaj emocioj, mi skribos nur pri apartaj el ili. Kaj en la unua vico certe indas skribi pri impresaj koncertoj de Andrej Korobejnikov, kiu dum du unuaj tagoj estis gasto de la aranĝo. Bedaŭrinde tial, ke mi povis veni al TEMoj nur en la dua tago de la renkontiĝo, mi ne ĉeestis la vesperan koncerton de la pianisto en la unua tago kaj komence tre ĉagreniĝis pro tio, sed poste, esplorinte



la programon de la koncerto kaj trovinte, ke tio estis la programo, kun kiu Andrej koncertis lastfoje en nia urba filharmonio, – mi iom trankviliĝis. Sed en la dua tago mi jam plene ĝuis lian koncerton, okazintan en la Tiĥvina kapelo apud la domo-muzeo de Rimskij-Korsakov. Dum ĝi Andrej ludis pianan muzikon de sia ŝatata komponisto Skrjabin kaj dum paŭzoj inter la muzikaj verkoj voĉlegis proprajn poemojn. Ŝajne tio iĝis neatendita malkovro de ankoraŭ unu talento de A. Korobejnikov – lia mirinda poezia talento – por multaj ĉeestantoj! Restis en la memoro vere neforgesebla impeso de tiu eksterordinara koncerto!

Maleblas ne skribi ankaŭ pri du belaj vesperaj koncertoj de mia ŝatata Esperanta muzika bando “Ekvinokso” en konsisto : Andrej Obrezkov kaj Valerij Vorobjov el Ivanovo, Evelina Sokolova el Krasnojarsko kaj Aleksandr Osokin el Sankt- Peterburgo. Tiu kvaropo ĝojigis la publikon per siaj malnovaj kaj tute novaj kantoj dum du vesperoj, kreinte tre animecan kaj amikecan etoson en la salono, kiam ĉiuj volonte kunkantis.

“Aparta kanto” estis la festa krea vespero kun la nomo «Improvizado pri la temo: “Vivo de Mikaelo Bronŝtejn en blusa stilo”», kiun preparis tiĥvinaj esperantistoj dediĉe al la jubileulo. Dum ĝi ili montris filmeton pri lia vivo kaj agado, deklamis laŭvice liajn poemojn, plenumis liajn kantojn kune kun Mikaelo aŭ sen li. Post tiu belega arta parto de la programo sekvis multaj gratuloj, kiam la jubileulon gratulis tiĥvinaj gravuloj, amikoj neesperantistoj kaj certe esperantistoj el diversaj urboj de nia vasta Rusio. La programon de la krea vespero brile gvidis Vera Vlasova. La festado daŭris ankoraŭ post la reveno en la bazejon, kie okazis koncerto de Mikaelo kune kun Sergej Straŝnenko. En la sama salono estis aranĝita bela festeno: sur la tabloj ĉe muro ĉiujn atendis regalaĵoj, kaj ĉiu povis senceremonie preni pokalon kun vino aŭ pli forta trinkaĵo kaj iun manĝaĵon kaj gustumi ĉion surloke, aŭskultante la kantadon de Mikaelo kaj Sergej. Estis vere senĝena kaj gaja etoso, kiam ĉiu povis ĝoje senti sin parteto de tiu bela festo kaj volis kunkanti.

Certe ne nur kultura programo, sed ankaŭ la kleriga parto de la evento estis riĉa kaj varia. La pluveta vetero ofte pelis nin el la arbaro, kie ni serĉis en la herbo blukolorajn bidojn de mirteloj, aŭ de lagostrando en la ĉefan konstruaĵon, kie okazis interesaj prelegoj. Mi ne listigu ilin ĉiujn, sed menciui, ke mi mem volonte vizitis kelkajn prelegojn de la prelegciklo “Lingva metiejo de prof. A. Melnikov”, kiuj ofte similis ne al klasikaj prelegoj, sed al la diskuttrondoj kaj spritaj prezentaĵoj. Okazis ankaŭ interesa “Literatura metiejo de Valentin Melnikov” (el Moskvo) kaj alloga “Pentroarta metiejo de Nina Korĵenevskaja” (el Ufo).

Mi limigu min en miaj rakontoj pri miaj impresoj pri TEMoj, ĉar volas ankaŭ menciui pri mia posta vojaĝo al Sankt- Peterburgo kaj kelkaj tagoj, pasigitaj tie, same en tre animeca kompanio de amikoj-esperantistoj. Mi komencu de tio, ke la semajnon en la norda ĉefurbo ni loĝis en la agrabla hejmo de la peterburga esperantistino Svetlana Ejst, kiu mem partoprenis tiutempe la UK – on en Finnlando kaj min kaj Mirina afable gastigis la edzo de Svetlana – Oleg Ciganov, same esperantisto, kaj ŝia filo Anton. Ankaŭ tio iĝis unu el la agrablaj por mi impresoj. Kaj en Sankt-Peterburgo ni multe promenis poste tra la urbocentro, laŭ la kajo de la rivero Neva, en la Somera Ĝardeno, vizitis muzeojn, agrable pasigis la tempon en kafejoj – ĉiam en esperantista kompanio: jen kun la krasnojarskanoj Lena Ŝaravina kaj Sergej Ĵilejkin, jen kun niaj junaj geamikoj Tatjana Stepanova kaj Ilja Gnusarjov. Eĉ gaste ni vizitis la novan hejmon de nuna peterburgano Ilja Muravjov en la apudurbo Murino. Ĉiuj tiuj tagoj estis plenaj de neforgesebla amika komunikado, kiun la franca verkisto Antoine de Saint-Exupéry nomis la plej granda lukso de homa vivo. Mi estas dankema al la vivo pro ĝi!

Raja Kudrjavceva, Jekaterinburgo

https://vk.com/ekaterinburgo?w=wall-8143994_654



Mia unua BET

Ĉi somere mi havis feliĉon partopreni eĉ du Esperanto-aranĝojn: BET-55 (Baltiaj Esperanto-tagoj) kaj TEMojn (Tihvinaj Esperanto-Metiejoj).

Tiel okazis, ke la litovian urbon Panevėžys, kie pasis la ĉi-jara jubilea BET, mi kelkfoje vizitis en mia juneco kaj, certe, estis por mi interese post multaj jaroj revidi ĝin. Krome, antaŭe mi tiom multe aŭdis pri BEToj! Kaj jen, tiu ĉi, la 55-a, iĝis mia unua BET.

Ĝenerale, BET estas konata al multaj esperantistoj internacia Esperanto-aranĝo kun la multjaraj tradicioj. BEToj okazadas laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio kaj kunvenigas amason da partoprenantoj el diversaj landoj. Al tiu ĉi BET aliĝis 425 esperantistoj el 37 landoj.

BET-55 komenciĝis la 6-n de julio, ĝuste kiam Litovio festas Nacian Tagon. Litovoj havas belan tradicion: je la 21-a horo vespere en tiu tago kanti la himnon de Litovio. Kaj sendepende de tio, kie estas litovoj en tiu momento, ili kantas ĝin en la tuta mondo. Ankaŭ en la unua vespero de BET-55 tio sukcese funkciis, tuj post la bela koncerto de la tre konata al la partoprenantoj kantistino Natalia Berce. La koncerto de Nataša estis vere animeca, ŝi elektis por ĝi la kantojn de sia juneco. Plen-plena halo de la ĉefa salono volonte kunkantis.

En la dua tago, la 7-n de julio, matene estis malfermo de Somera Universitato, dum kiu paralele okazis multege da prelegoj kaj oni povis elekti ion je sia gusto. Estis prelegociklo de prof. A. Gudavičius pri la litovaj lingvo, kulturo, historio; prelegserio de d-ro Gábor Márkus “Ĉu Esperanto plibonigis/plibonigos la mondon?”; prelegociklo “Lingvo kaj kulturo” de prof. Ilona Koutny kaj aliaj. En BET ankaŭ okazis apartaj prelegoj kadre de la vica Sanmarineca Universitata sesio de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj), kiun gvidis ĝia prezidanto Amri Wandel.

La solena inaŭguro de BET-55 okazis la 7-n de julio en la urba Komunuma Centro. Komence la prezidanto de la organiza komitato kaj prezidanto de LEA Povilas Jegorovas prezentis la oficialajn gastojn kaj post la enkonduka parolado eksonis la himno de Esperanto, kunkantita de la partoprenantoj. La inaŭguron partoprenis la urbestro, multaj ministroj kaj politikistoj. En la 2019 –a jaro estas ankaŭ la 100-jara jubileo de Litova Esperanto Asocio kaj la 60-jara jubileo de BEToj ĝenerale. Jubilean BET-on emocie, kun tre impresaj rememoroj salutis Biruta Rozenfelde, la inciantino de la unua BET antaŭ 60 jaroj ĉe la latvia ĉefurbo Riga.

Post la inaŭguro de BET-55, okazis la kultura programo, dum kiu faris koncerton kaj dancprezentojn artaj grupoj de Komunuma Palaco de la urbo Panevėžys kaj poste en la urba Komunuma Centro por ĉiuj BET-anoj estis urbestra akcepto, kun riĉaj regalaĵoj kaj trinkaĵoj.

Dimanĉe vespere estis ankoraŭ unu belega koncerto de la vaste konata esperantista grupo Sepa kaj Asorti. Ĝi estas tripersona familia grupo, kiu profesie prezentiĝas dum grandaj internaciaj muzikaj festivaloj, motorbiciklaj festoj, foiroj, naciaj festoj, Universalaj Esperanto-Kongresoj ktp. Ili kantas en la stiloj kontrea, blusa, folka kaj roka en la lingvoj rusa, litova, angla kaj Esperanto kaj bonege popularigas Esperanton tutmonde por neesperanta publiko.

La programo de la BET estis riĉa kaj varia, ĝia strukturo tre similis al UK-oj, kaj per ĉiunivelaj Esperanto-kursoj ĝi memorigis al mi



niajn SEJTojn. Mi scias, ke grupon por komencantoj gvidis Stano Marček el Slovakio, kiu instruis per sia konata “rekta metodo”; por komencintoj de A2 grupo instruis Nina Petuchovska de Pollando kaj ĵurnalistino, aktivulo Abdurahman Junusov de Dagestano; kursanojn de grupo B2 progresigis du instruistinoj el Francio: Anna Jousions kaj Françoise Noireau; kaj C1 grupon gvidis la konataj geinstruistoj Svetlana Smetanina el Rusio kaj Mikaelo Lineckij el Ukrainio. Mi mem neniu el kursoj partoprenis, sed mi volonte vizitis prelegojn de prof. Aleksandr Melnikov “Pri Esperantaj vortoj – kun humuro kaj serioze” kaj «Leksikaj novismoj kaj neologismoj», kiuj estis brilaj kaj spritaj. Interesan prezentaĵon pri Zamenhofaj Esperanto Objektoj (ZEOj) faris pola esperantisto Robert Kamiński, ZEO-delegito de UEA. Li ankaŭ faris tre bonan ekspozicion pri ZEOj, kiu troviĝis en la koridoro de la universitata konstruaĵo.

Min impresis ankaŭ la prelego de la franca esperantisto Jean-Claude Roy el Amiens, la urbo de Jules Vern. Li zorgas pri la loka klubo kaj agas kun la urba magistrato, havas multajn projektojn por Esperanto kaj ĉefe interesiĝas pri enkonduko de Esperanto en la francan edukad sistemon, tradukas librojn el la franca al Esperanto. Interesa estas lia devizo en la Esperanto-agado: “Obstine antaŭen!”

Merkrede okazis tuttaga ekskurso. Matene ni vizitis Biržai-kastelon, konstruitan en la 16 jarcento. Nuntempe en la kastelo estas muzeo de la distrikto, en kiu ni konatiĝis kun iloj de tradicia bierfarado kaj gastamaj tradicioj de litovoj, aŭskultis litovajn kantojn kaj ĝuis gustumadon de biero, fromaĝo kaj pano de la distrikto Biržai. Poste ni vizitis la regionan parkon, kie ni vidis ekspozicion pri karstaj procezoj kaj grimpis al la ŝip-simila rigardoturo.

Ni vizitis ankaŭ la bienpalacon de la urbeto Pakruos. Ĉi tiu palaco estas la plej granda konserviĝinta ĝis nun tuta komplekso de bienpalacaj konstruaĵoj en Litovio, okupanta 40-hektaran teron. La bienpalaco estas registrita en la listo de la Litovia Heredaĵo kaj en la libro de rekordoj de Litovio, kiel la plej granda palaco bieno.

Mi ŝatus skribi ankoraŭ pri kelkaj koncertoj, kiuj min vere impresis: pri la koncertoj de Kaši, blinda muzikisto, komponisto kaj kantisto el Hamburgo, kiu prezentis proprajn kantojn kaj internacie konatajn. Tiel li kantis la kanton “Miliono da zorgoj”, kreitan de la fama komponisto Raimonds Paūls je versoj de latva poeto. Post kelka tempo la kanton famigis Alla Pugaĉjova, kun la sama melodio, sed kun tute aliaj vortoj, ol en la latva originalo.

Plezure mi ĉeestis ukrainan koncerton, kiun iniciatis eksa ukrainino Marina Korotj. Dum ĝi kantis ukrainajn popolajn kaj nuntempajn kantojn Vladimir kaj Ella Kononjuk el Germanio, Nataŝa Ivanova kaj Tatjana Kolomic el Ukrainio, Segej Straŝnenko el Latvio, Natalia Berce el Svedio, Mikaelo Lineckij el Ukrainio-Israelo.

Estis tre interesa koncerto de talenta korea kantistino Amira Chun. Ŝi estas profesia kantistino, kiu kantas poeziajn kantojn de Koreio. Amira Chun eklernis esperanton antaŭ du jaroj kaj nun ŝi mem instruas Esperanto-kantojn en Seula Esperanto-kulturcentro. Necesas rimarki, ke multnombraj koreaj partoprenantoj kolorigis kaj riĉigis la programerojn de ĉi-jara BET kaj Amira Chun kreis speciale unikan orientecan etoson dum sia koncerto.

Ankoraŭ unu bela kaj menciinda koncerto estis “Sola kaj kune” de koreaj kantistoj, kiuj kantis koreajn kaj litovajn kantojn kun akompano de koreaj tradiciaj instrumentoj. Inter ili estis juna, 17-jaraĝa kantistino-modelino Jogailė. Ŝi naskiĝis en esperantista familio: la patro estas koreo kaj la patrino estas litovino. Dum 10 jaroj Jogailė frekventis muzikan lernejon kaj lernis klasikan kaj popularan kantadojn kaj gajnis premiojn en pluraj internaciaj kaj enlandaj lernejanaj kantkonkursoj. Ŝi kantis plurfoje la litovan himnon en internaciaj sportaj matĉoj. En Esperantujo ŝi kantis “Tempo pasos nur” dum la muzika paŭzo de la inaŭguro de la 102-a Universala Kongreso de Esperanto en Seulo.

Kaj certe mi plezure ĉeestis la koncerton de nia samlandano Mikaelo Bronŝtejn, kiu ĝojigis la publikon per siaj novaj kaj famaj malnovaj kantoj. Mi ĉeestis ankaŭ lian prelegon “SEJM legenda” kaj lian aŭtoran horon. Cetere, por la ĉiutaga gazeto de BET-55 “Abelo”, Mikaelo verkis amuzan versaĵeton, per kiu mi volus fini mian priskribon de la evento:

“Bone fartas ni en BET –
Kun prelegoj malenuaj,
Kun ekskursoj logaj, ĝuaj,
Kun koncertoj sentovekaj.
Se ne pluvo, nek pluvet’
Ni kontentus tute, sed...”

Jelena Uspenskaja, Jekaterinburgo

P. S. La foto de oficiala fotisto de BET-55 Gražvydas JURGELEVIČIUS. Pli da aliaj fotoj vi povos trovi ĉe <https://vk.com/ekaterinburgo>

El dissendolisto ural-siberio-dl@googlegroups.com

Mia partopreno en la 104-a Universala kongreso en Lahtio

La 104 – a Universala Kongreso de Esperanto en Lahtio (Finnlando) estis por mi ĝenerale la dua UK, kiun mi partoprenis. Kaj la unua por mi estis jubilea, la 100-a UK en Lillo (Francio, en la 2015-a).

Mi eniris en la seskapan grupon de rusiaj esperantistoj, kiun gvidis REU-estraranino Svetlana Smetanina; ni daŭrigis vojaĝi ankaŭ postkongrese, tra Skandinavio, kaj tiam al ni aliĝis ankoraŭ unu –du esperantistoj kaj nia grupo iĝis sep- aŭ foje eĉ okpersona. Plene partopreni tiun vojaĝon estis ideo de mia edzo Gafur, ankaŭ esperantisto, do ni aliĝis al la grupo kune.



La 104-a UK en Lahtio daŭris unu semajnon, de la 20-a de julio ĝis la 27-a. Ĝenerale Finnlando akceptis UK-ojn jam kvarfoje: en la 1922-a okazis UK en Helsinko, en la 1969-a – ree en Helsinko, en la 1995-a – en Tampere kaj ĉi-jare – en Lahtio. Al la kongreso ĉi-foje aliĝis 917 esperantistoj el 58 landoj. El Rusio partoprenis ĉirkaŭ 40 esperantistoj.

La kongresejo estis granda sportejo ISKU Areena. Tiu moderna, komforta, trietaĝa konstruaĵo havis sufiĉe da ejoj por okazigi grandan internacian eventon kiel UK. Dum la semajno funkciis entute 11 salonoj, kiuj tradicie havis nomojn de elstaraj forpasintaj esperantistoj, 8 el kiuj, cetere, estis finnoj. En la etaĝoj estis la trinkejoj, molaj sofoj por komforta komunikado kaj restado. Estis agrable, ke tagmanĝo estis bone aranĝita en bufedo de Isku Areena.

Dum la aranĝo estis realigita varia kaj riĉa programo: prelegoj pri Finnlando, Lahtio, planlingvoj kaj Esperanto-muzeo; diskuttrondoj pri Sameoj (nemultnombra finno-ugra popolo), pri UN (“La tempo kriza aŭ oportuna?”). Okazis lingvaj kursoj (ekzemple ekspresa kurso de la finna) kaj Esperanto-kurso por komencantoj, kiun gvidis Katalin Kovats kaj paroliga kurso, kiun gvidis ŝia edzo, okazis KER-ekzamenoj por dezirantoj. Por la programo de la kongreso aktive kontribuis ankaŭ niaj rusiaj esperantistoj; tiel la Kongresano Temon ĉi-foje reĝisoris bone konata al ni ĉiuj nia aktivulino Olga Ŝilajeva el Glazovo; dum la kongreso prelegis moskvaj esperantistoj Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova kaj ili rakontis pri nuntempo kaj historio de Esperanto-eldonado en Moskvo. Vladimir Minin el Tomsko preparis broŝurojn pri la eksplodo de la 11a de septembro en Usono, li parolis pri ĝi. (Tiumtempe Vladimir loĝis en Usono)

Dum la kongreso aktive funkciis Libroservo, okazis ankaŭ Literatura forumo, Faka Forumo, fotopromeno, futbalmatĉo (kaj esperantistoj gajnis la matĉon), ktp., fakaj kunvenoj de diversaj asocioj: de matematikistoj, naturalistoj, ĵurnalistoj, muzikistoj, sennacianoj ktp. Mia edzo Gafur partoprenis la kunvenon de la jurista asocio.

Ĉiutage aperis freŝa Kongresa kuriero – gazeto, kiu nomiĝis La Saltejo. La titolo referencas al skisaltejoj, unu el plej rimarkeblaj vidindaĵoj de Lahtio. La unua Skisaltejo aperis en la 1922 –a. Ĝi estis 40 metrojn alta. Modernaj Skisaltejoj estas multe pli altaj, ili situas apud Isku Areena, tial la oficiala komuna foto estis farita je la fono de skisaltejoj.

Vespere esperantistoj ĝuis koncertojn, teatraĵojn: ekzemple, okazis belega orgena koncerto (de Itala esperantisto Andriana Falcioni); Saŝa Pilipoviĉ el Serbio kantis ciganajn kantojn, tradukitajn de Mikaelo Bronŝtejn kaj ankaŭ prezentis la multmedian monologan dramon “Vivo de Galileo” (tradukitan el la serba al Esperanto); furoris koncertoj de JoMo, de la dueto Kajto, de la grupo Sepa kaj Asorti k.t.p.

La dudek sesan de julio okazis Esperanto-aŭkcio, dediĉita al Esperanto-tago, kiun tradicie gvidis H.Tonkin. Tridek kvar libroj kaj kvardek sep objektoj estis venditaj

En la ekskursita tago certe estis multaj interesaj ekskursoj. Ni promenis tra la verda Lahtio, kiu situas 100 kilometrojn nord-oriente de Helsinko, loĝantaro de la urbo estas 118 miloj. La nomo de la urbo tradukiĝas de la finna kiel “golfo”. La urbo situas ĉe la bela lago Vesijärvi, kaj ĉe ĝia haveno oni povas ĝui trankvilajn promenadojn ĝis la vastaj, verdaj arbaroj. La aero estas pura kaj la urbo-centro kvietita. En la urbo multas arkitekture allogaj konstruaĵoj, interesaj monumentoj. Nin impresis Sibelius Hall – plej granda kongresejo kaj koncertejo en Eŭropo; ĝi estas konstruita plene el altvalora ligno, havas tre bonan akustikon kaj kongresanoj aŭskultis en ĝi unu el koncertoj en Esperanto dum la kongreso.

Menciindas, ke la Kongresa Temo ĉi-foje havis belan titolon: “Vivanta naturo, floranta kulturo.” Tial oni diskutis plurajn aferojn, ekzemple, “Ĉu eblas kompreni la kulturon de iu homgrupo tra rilatoj al ĝia vivmedio?” ktp. Oni auskultis la prelegon “Lahtio – la verda ĉefurbo de Eŭropo en 2021”, kaj okazis natur-kulturaj ekskursoj (“Natura Lahtio”; “Recikligo kaj naturprotektado.”) Mi konvinkiĝis, ke Finnlando estas vere ekologia lando. Ĝi havas tre bonkvalitan trinkakvon, kiun eblas trinki de ĉiu akvokrano. Ni manĝis bongustajn naturajn produktojn. La finna naturo similas al nia. Sed ili havas pli multe da piceoj ol en Uralo. Malgrandajn urbojn ĉirkaŭas arbaroj kaj arbaretoj. Imagu, plurfoje ni renkontis leporojn kaj sciurojn en la urbaj arbaretoj! Laŭvoje tra la arbaro al la bushaltejo en Nastola ni ĉiam manĝis berojn! Eblas ankaŭ diri, ke la naturo trankviligas finnojn kaj ili estas tre diskretaj kaj malrapidemaj :) Ankaŭ ni spertis la trankvilecon de la finna naturo dum la 104-a Universala kongreso en Lahtio.

Natalija Mansurova, Jekaterinburgo

P. S. : sube vi trovos ligilojn al la filmeto pri Lahtio kaj povos vidi malgarandajn film – raportojn pri la kongresaj tagoj:

<https://www.youtube.com/watch?v=5EFOVs-PDkg>

<https://www.youtube.com/watch?v=844ErRFf4Mw>

<https://www.youtube.com/watch?v=1bXiDPmIDbk>

<https://www.youtube.com/watch?v=7Schxw4Gj7c>

<https://www.youtube.com/watch?v=I8rAtBc7Fsk>

<https://www.youtube.com/watch?v=XEa7taCl9MI>

<https://www.youtube.com/watch?v=qCiaWP53bvA>

<https://www.youtube.com/watch?v=aN4uY6gzy-o>

<https://www.youtube.com/watch?v=Czi0ChPsWa0>

P. S. : vizitinte la paĝaron Esperanto en Jekaterinburgo: <https://vk.com/ekaterinburgo>

vi ankaŭ povos vidi kelkajn fotojn pri la evento.

El dissendolisto ural-siberio-dl@googlegroups.com

Internacia agado

El la Universala kongreso

Resumo de la reĝisoro

Kiel jam estas vaste konate, la Kongresa temo de la 104-a UK en Lahtio estis “Vivanta naturo, floranta kulturo”.

Kiam mi ricevis la taskon esti reĝisoro de la Kongresa temo, mi starigis la sekvajn demandojn por prilumi dum la kongreso: Kiu ligo ekzistas inter naturo kaj kulturoj? Ĉu eblas kompreni kulturon de iu homgrupo tra rilatoj al ĝia vivmedio? Ĉu detruado de naturo postsekvigas detruadon de kulturo? Ĉu rilatoj inter naturo kaj kulturo estas ambaŭflankaj? Kio do estas kulturo?



Nun, farante analizon de la kongresa semajno, mi konstatas, ke la demandoj estis responditaj. La respondoj estis trovitaj dum tri aktivaj podiaj diskutoj (prelegis 10 homoj el 9 landoj), IKU-, AIS-prelegoj kaj aliaj kunvenoj, renkontiĝo kun reprezentantoj de tri sameaj lingvoj, 2 natur-kulturaj ekskursoj, dum neformalaj konsversacioj en salonoj kaj kongresaj koridoroj.

Kernaj punktoj de la kongresaj diskutoj aperis en la kongresa rezolucio:

La 104 –a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Lahtio de la 20-a ĝis la 27-a de julio 2019, kun 917 partoprenantoj el 57 landoj, traktinte la kongresan temon “Vivanta naturo – floranta kulturo”, en tri kongrestemaj sesioj, pluraj prelegoj, kaj diversaj aliaj kunvenoj kaj ekskursoj en la regiono de Lahtio, notante la kongruecon de la temo kun la lastatempa nomumo de Lahtio kiel Verda Ĉefurbo de Eŭropo por 2021; substrekante la ligitecon de la temo kun la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por la jaro 2019:

deklaras, ke daŭripova naturo akompanas daŭripovan socion kaj daŭripova socio akompanas egalecan pritrakton de la homoj, ankaŭ rilate lingvon;

avertas, ke la nunaj procezoj de ekonomia tutmondiĝo egale minacas la

daŭripovon de kultura diverseco kaj biologia diverseco;

substrekas, ke la Esperanto-movado, kiel movado por alispeca tutmondiĝo bazita sur respekto kaj valorigo de lingva kaj kultura diverseco, estas samtempe movado por daŭripova evoluigo en vasta senco;

atentigas, ke multaj individuoj kaj organizoj en la Esperanto-movado jam aktive laboras por pli ekvilibraj rilatoj inter naturo kaj kulturo, interalie agadoj por interkultura edukado, interhoma solidareco, kaj subteno al lokaj iniciatoj por daŭripova evoluigo;

kaj alvokas por interproksimiĝo kaj kunlaboro inter la Esperanto-movado kaj aliaj organizoj kaj movadoj por la protektado kaj evoluigo de lokaj kulturoj kaj naturmedioj en monda skalo.

Kulturo kaj naturo estas niaj vivmedioj, kaj rilatoj inter tiuj du sferoj estas specife proksimaj kaj profundaj. Naturo estas nia biologia vivmedio. Se ĝi estos malkonvena, malkomforta por ni, malpura kaj danĝera, ne eblas surbaze de tio konstrui evoluantan kulturon. Kulturo estas nia socia vivmedio. En la epoko de tutmondiĝo vere gravas protekti naciajn kulturojn, por moderna homo serioze gravas kompreni limojn de tutmondiĝo – ĝis kiam eblas akcepti tutmondajn aferojn, kaj de kie konservi lokajn kulturojn.

Kiel oni diras, necesas komenci de vi mem – minimumigi uzadon de plastajoj, aboni elektronikajn versioj de revuoj, ne uzi vane puran akvon en lavujo, kie eblas, anstataŭigi aŭtojn per bicikloj, k.t.p.

Do, ni, homaro, semu nur bonon, ni protektu vivantajn naturaĵojn por havi kulturojn florantajn, ni eduku infanojn per nia propra pozitiva ekzemplo, ni lernu indiĝenajn lingvojn, se ni apartenas al ties komunumo, ni estu Homoj per granda litero H. Ni vivu en konscio!

Mi volas esprimi dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis al la Temo, ĉu per prelegoj, ĉu per demandoj, ĉu per privataj mesaĝoj, ĉu kunverkante la rezolucion. Ni daŭre kunlaboru, ja prelegoj ne estas fino de nia agado! Ek!

Olga Šilajeva, reĝisoro de la Kongresa temo.

la artikolo estas verkita por la septembra numero de “Esperanto”

El dissendolisto ural-siberio-dl@googlegroups.com

Regiona agado

Konatiĝu: *Dmitrij Ĵuravljov*, nova kunordiganto de esperantista movado en Suda Regiono

Dmitrij, vi estas nova esperantisto, vi memstare lernis Esperanton en tiu ĉi, 2019, jaro. Vi scipovas la anglan, francan kaj hispanan, vi konatiĝis ankaŭ kun tokipono. Ĉu vi vere bezonas Esperanton? Kial vi decidis lerni ĝin?

Jes, mi bezonas Esperanton, ĝi helpas al mi lerni aliajn lingvojn. Pri tokipono mi eksciis pere de Esperanto. Sed Esperanto por mi estas ne nur lingvo, estas granda ideo pri pli bona mondo.

Vi laboras en lernejo. Kion vi instruas? Kiu estas aĝo de viaj lernantoj? Kiun utilon, laŭ vi, povus liveri scio de Esperanto por lernejoj?

Mi instruas la anglan. Aĝo de miaj lernantoj estas 10-17 jaroj. Mi rakontas al ili pri Esperanto. Mi esperas, ke ili ekinteresiĝos ankaŭ pri aliaj fremdaj lingvoj, ne nur pri la angla, kaj ke Esperanto helpas al ili lerni lingvojn, samkiel helpas al mi. Mi rakontas al ili ankaŭ pri la Interna Ideo de Esperanto, pri ĝia neŭtraleco kaj justeco, tio permesos al ili ekvidi lingvajn problemojn en la mondo.

Ĉu vi intencas instrui Esperanton en tiu ĉi jaro? Al kiu?



Jes, mi planas instrui Esperanton ekde oktobro-2019 en nia urba biblioteko por ĉiuj, kiuj volas lerni la lingvon. Jam nun mi okazigas lecionetojn por kelkaj geknaboj, kiuj ekinteresiĝis pri Esperanto kaj venadas al mi dum sia libera tempo. Mi pripensas partoprenon en la projekto “Unu leciono de Esperanto por ĉiu lernanto”.

Mi jam sendis leterojn kun la propono okazigi la lecionon al kelkaj lernejoj kaj ricevis respondojn, sed estas ankoraŭ frue raporti pri rezultoj.

Kun kiuj volgogradaj esperantistoj vi jam konatiĝis, kie tio okazis? Eble, vi mem jam kontribuis al Esperanto-vivo en via urbo?

En nia urbo ekzistas klubo “Espero”, mi amikas kun la klubanoj kaj konas ĉiujn. Mi vizitis kelkajn klubajn kunvenojn, urbajn renkontiĝojn kaj eksterurbigojn. Kaj eĉ estis elektita nova prezidanto de la klubo. En tiu ĉi jaro mi kreis grupon “Esperanto en Volgogrado” en la socia reto “V Kontakte” <https://vk.com/club37656643>, kie aperas novaĵoj el la vivo de volgogradaj esperantistoj. En la fako de fremdlingva literaturo ĉe la urba biblioteko mi okazigis jam du kunvenojn por ĉiuj interesiĝantoj: 19.04.2019 “Konatiĝo” kaj 19.05.2019 “Esperanto kaj la greka”. Sume ilin vizitis 9 homoj. Ne multe, sed la etoso estis vigla kaj amika.



Lernantoj ripetas numeralojn

Vi konsentis esti kunordiganto de esperantista movado en la Sudo. Kiujn aliajn esperantistojn de la Suda federala regiono de Rusio vi konas?

Ankoraŭ ne multajn. En ĉi tiu jaro mi konatiĝis kun Vladimir Viĉegjanin. Li estas de Moskva provinco (Naro-Fominsko), sed somere loĝas en Krimeo.

Kiujn ideojn por kunordigi la agadon de la esperantistoj en la regiono vi havas? Kiel vi intencas realigi viajn ideojn?

Vladimir rakontas al mi pri esperantistoj el Jalto. Ili volas organizi renkontiĝon somere 2020 apud la urbo. Mi intencas kunvenigi samideanojn de nia regiono en tiu ĉi renkontiĝo. Do, necesas kompili adresaron de esperantistoj en nia regiono, kontakti la homojn dum la jaro, kolekti informojn pri ilia aktuala esperantista agado, provi aktivigi tiujn, kiuj povus fari ion por Esperanto. Komence de la lernojaro mi provos partoprenigi iujn sudajn urbojn en la projekton “Unu leciono pri Esperanto por ĝelernantoj”. Poste ni vidos.

Dankon pro viaj respondoj. Mi esperas je fruktodona kunlaboro kun la Sudo, deziras sukcesojn al vi kaj la verdan disfloron al la kunordigata de vi regiono!

Intervjuis: Irina Gonĉarova, REU-

Ekstera informado

En MUZEO PRI LA LINGVOJ DE LA MONDO estas konstanta ekspozicio pri Esperanto



Ĉu vi scias, ke en tiu ĉi somero aperis la unua en Rusio kaj dua en la mondo Muzeo pri la lingvoj de la mondo (Музей языков мира)? La esperantista familio Grebeŝĉenko el Uljanovsko, ripozinte en Krimeo, malkovris ĝin tuj post la malfermo en belega montaro apud Aluŝta.

Maksim Grebeŝĉenko riproĉis Jevgenij Fotin — la gastaman direktoron de la muzeo — pro foresto de informoj pri Esperanto kaj promesis helpon. Ricevinte de Maksim kontaktojn de la muzeo, mi skribis al la organizantoj. Ni tuj gefratece amikiĝis kaj traktis priesperantan ekspozicieron en la muzeo. La 24-an de aŭgusto al la muzea adreso iris aro da presaĵoj kaj ankaŭ la surmura “medalo” kun ĉizita portreto de Zamenhof. La 4-an de septembro oni jam raportis pri alveno de la sendaĵo.

Jevgenij Fotin skribis:

*Ирина,
здравствуйте!
Получили*

посылку, огромное вам спасибо! Очень богатая подборка материалов, отнесемся ко всему со всем уважением, всё разместим в музее, в том числе значок Заменгофа. Позже напишу подробности. Irina

Popularigo de Esperanto pere de muzeoj estas neplugita kampo en Rusio, kiu, certe, bezonas specialan atenton. Se iu el niaj legantoj havas sperton pri laboro kun muzeoj, bonvolu rakonti pri ĝi. Kaj senhezite rekomendu la Muzeon pri lingvoj de la mondo al ĉiuj konatoj!

Pli pri ĝi vidu ĉi tie: <https://vk.com/linguamuza> https://www.youtube.com/watch?time_continue=7&v=4286zfUqlo4



Ирина Gonĉarova, respondeculo de REU pri ekstera informado

mirinda.strigo@gmail.com

<https://vk.com/informado>

**Nova projekto de REU kaj ILEI en Rusio,
kiun ni kore kaj esperplene invitas vin partopreni:
UNU LEClONO PRI ESPERANTO POR GELEARNANTOJ**

Enkonduko

Jam kelkajn jarojn Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) disvastigas la projekton “Unu leciono pri esperanto por ĉiu lernejo en la tuta mondo”, proponitan de Klaus Friese el Germanio (vidu retejon de ILEI <http://www.ilei.info/agado/projektoj.php>). La projekto celas havigi al ĉiuj lernantoj ekde la aĝo 10 jaroj tiun lecionon*. La ideo estas nobla, sed aspektas utopia eĉ por eŭropaj landoj, malgraŭ multaj jam preparitaj help-materialoj por realigi ĝin. Rekaptinte la esencon, ni provu adapti ĝin al la kondiĉoj de Rusio. Unuavice temas pri malvastigo de la celo kaj pri konkretigo de la taskoj. Konforme al tio la rusa versio de la projekto ricevas la nomon “Unu leciono pri Esperanto por gelernantoj”.



Prezento de la projekto

Titolo: Unu leciono pri Esperanto por gelernantoj

Celo: Konatigi gelernantojn kun Esperanto kiel lingva kaj socia fenomeno, liveri al ili informojn pri manieroj lerni la lingvon, kun helpanto aŭ memstare, inkluzive per interreto.

Celgrupo: Gelernantoj de la aĝo 11-21 jroj: 5aj – 11aj klasoj de mezlernejo, studentoj de unuaj lernejoj kaj aliaj lernantaj grupoj.

Loko: ĉefe mezlernejoj kaj universitatoj, sed povas esti ankaŭ kulturdomoj, bibliotekoj, infanaj tendaroj, festivaloj ks.

Formato: lernejtipa leciono, prelego, dezirinde kun lumbildprezentado kaj diversaj aktivigaj eroj.

Enhavo: Zamenĝof, interna ideo, ĉefaj faktoj pri la lingvo kiel socia fenomeno, gramatika skizo, informfontoj, kie eblas lerni, kontaktoj de lokaj esperantistoj.

Tempo: speciale liverata de la lernejo aŭ alia kunvenejo, akceptanta la lecionon.

Daŭro de la leciono: 40-45 minutoj.

Prezentantoj: lokaj esperantistoj, studentoj-lingvistoj, ajnaj adekvataj kaj bone preparitaj personoj.

Subteno flanke de REU kaj de ILEI-membroj

Konfirmilo: Ĉiu prezentanto de Esperanto ĉe bezono aŭ prestiĝigo de la aranĝo rajtas peti kaj ricevi oficialan peton pri okazigo de la leciono kaj konfirmon pri kompetentoj de la prezentanto.

Prezentmaterialoj: nun estas kolektataj en la vK-grupo “Informu!” <https://vk.com/informado>. Ĉiuj estas invitatataj riĉigi la informojn per koncernaj materialoj aŭ rekomendoj. Bonvenas pretaj prezentaĵoj de Esperanto kaj ankaŭ materialoj por memstara kompilado de propra prelego.

Konsilantoj: konsilojn de spertuloj eblas ricevi en la vK-grupo “Informu!”, kie oni povas ankaŭ pridiskuti organizajn situaciojn kaj demandojn pri enhavo de la leciono.

Raportado: ĉiu prezentanto de Esperanto mem plenumas la nelongan demandaron (vidu suplemente), aldonas al ĝi 2-3 fotojn kun si mem kaj la aŭskultantoj kaj sendas ĉion al la regiona kunordiganto aŭ senpere al la ĝenerala kunordiganto de la projekto. La ĝenerala kunordiganto kompilas komunan landan raporton, kiu aperos en regionaj kaj landaj Esperanto-informiloj.

Laŭdfolioj: estos enmanigitaj al ĉiu raportinta prezentanto de Esperanto. Verŝajnas libropremioj.

Daŭro de la projekto: septembro-oktobro 2019.

Inicianto kaj kunordiganto:

Irina Gonĉarova, respondeculo de REU pri regiona agado kaj pri popularigo de Esperanto, membro de ILEI


mirinda.strigo@gmail.com

https://vk.com/mirinda_strigo

*Unu el principoj de ILEI estas labori malferme al la socio, aktive kunlaborante kun neesperantistaj organizaĵoj, ju pli altrangaj des pli bone. Per tio ILEI celas montri utilon de Esperanto al oficialuloj kaj vivan aktivecon de lokaj esperantistoj. En la “Informa kaj instrua strategio” de la agado estas rekomendoj eki la projekton de sinturno al decidantoj pri edukado je ĉiu nivelo (urba, provinca, kantona, ŝtata); ... lernejestroj, instruistoj, lingvoinstruistoj, gazetoj por instruistoj, sindikatoj por instruistoj, lertigejoj por instruistoj, universitatoj, lingvocentroj, aŭtoroj de lernolibroj, eldonistoj de lernolibroj, institutoj, kiuj okupiĝas pri edukado, plurlingvismo k.s.” Ankaŭ en Rusio ni penu sekvi tiujn rekomendojn, sed ni restu ĉe nia realeco.

Prelegvojaĝo de Vladimir Soroka en Volgio

La fama ukraina esperantisto, komponisto kaj socia aganto Vladimir Soroka antaŭnelonge finis sonregistradon de granda didaktika kantaro, surbaze de kiu li instruas Esperanton dum sep tagoj en sia fama Esperanto-kurso “Septima”. Fininte la penan laboron pri la registrado, kiu daŭris du jarojn, Vladimir eksentis sin preta rakonti pri sia kurso kaj pri sia aŭtora metodo, nomata *refrena*, al la edukistoj kaj klerigantoj de la mondo. Lia mesaĝo al instruistoj baziĝas sur la aserto de **Jan Amos Komenski**, fondinto de la humana scienca pedagogio, ke la unua lernata de infano lingvo neniuokaze devas esti nacia. Mem Komenski instruis komence la latinan kaj surbaze de ĝi — aliajn studobjektojn. Sed ja antaŭ 300 jaroj ankoraŭ ne ekzistis Esperanto.



Vladimir proponas Esperanton kiel la unuan lernatan lingvon kaj sian metodon kiel rapidan rimedon alproprigi ĝin. Dum sia vojaĝo tra Volgio Vladimir, ne sen grava helpo de lokaj esperantistoj, okazigis ses prelegojn, ĉiam kun grandioza sukceso. Andreo Grigorjevskij, la akompananto kaj helpanto de Soroka, diris pri lia prelego: "La plej ellaborita prezento de Esperanto, kiun mi iam vidis".

Jen la itinero de la prelegvojaĝo de Vladimir Soroka.

1/. La 17-an de aŭgusto. Pedagogia festivalo "Kiteĵ de la instruista koro". Svetlojar. Setlejo Vladimirskoje, Voskresenska provinco de Niĵni-Novgoroda provinco. Ĉeestis 48 partoprenantoj de la festivalo kaj gastoj. <https://www.youtube.com/watch?v=oqOore0IXeo&t=1678s>

2/. La 22-an de aŭgusto. Prezento de la refrena metodo antaŭ la instruistoj kaj metodikistoj de la Lernejo de fremdaj lingvoj "Lingvo por sukceso". Ĉuvaŝio, u. Ĉeboksaro. Ĉeestis 6 homoj. https://www.youtube.com/watch?time_continue=11&v=DQWvLoi51zk

3/. La 23-an de aŭgusto. Elpaŝo antaŭ pedagogoj de la rusa, ĉuvaŝa kaj fremdaj lingvoj en Ĉuvaŝa Respublika Instituto de edukado. Ĉuvaŝio, u. Ĉeboksaro. Ĉeestis 50 homoj. https://vk.com/videos-185546681?z=video-185546681_456239024%2Fclub185546681%2Fpl_-185546681_-2

4/. La 23-an de aŭgusto. Lernejo de fremdaj lingvoj "Lingvo por sukceso". Ĉuvaŝio, filio Blagoveŝĉenskij. Ĉeestis 12 homoj (membroj de Esperanto-klubo kaj la gastoj).



5/. La 26-an de aŭgusto.. Registrado de la renkontiĝo kun la aŭtoro de la refrena metodo Vladimir Soroka "Humana lingvo-orientita pedagogio de Jan Amos Komenski. Kiel kio ĝi estis elpensita." Ĉuvaŝio, u. Ŝumerlĵa, Telestudio "Nova realeco".

6/ La 28-an de aŭgusto. Elpaŝoj antaŭ pedagogoj de la urbo Ŝumerlĵa en la ĉiujara pedagogia konferenco en la sekcio «Instruisto de la estonteco». Ĉuvaŝio, u. Ŝumerlĵa. Ĉeestis ĉ. 40 instruistoj.

Ni insiste rekomendas al ĉiuj esperantistoj spekti la prelegojn de Vladimir Soroka, pripensi ilin kaj preni por si taŭgajn elementojn el lia riĉa materialo por dece prezenti Esperanton al ekstera publiko. Nermalutilus okazigi por la majstro rondvojaĝojn tra aliaj regionoj de Rusio. Kompreneble, por tio bezonatas firmaj interkonsentoj kun organizantoj de konvenaj porinstruistaj aranĝoj. Tiucele povus helpi klariga reklamado, la filmojn kun prelegoj de Soroka kaj apogo de REU, inkluzive kunordigon de la itinero, rekomendajn leterojn kaj simile.

Irina Gonĉarova

Rikolto de diversaj mencioj en lokaj gazetoj ĉirkaŭ la 26-a de Julio estis nekutime granda, estis dekoj da malongaj kaj eĉ mezlongaj informoj pri "Tago de Esperanto" en diversaj lokaj gazetoj kaj paĝaroj! Ĉi tie estas menciataj nur iom pli neordinaraj artikol(et)oj.

Maljuna fiziologo kaj programisto el Peterburgo volas fari ion pli bonan ol Esperanto

http://novayagazeta.spb.ru/articles/12261/

Esperantistino el Ĉelebinsko rakontas pri propedeŭtika valoro de la internacia lingvo

https://hornews.com/history/devushka_iz_cheljabinska_vyuchila_nemeczkiy_i_francuzskij_blagodarja_iskusstvennomu_jazyku_esperanto/

En Tverjo oni memoras entuziasmon pri Esperanto en 1920-aj jaroj:

14 aŭgusta 1926 goda en Tveri byl organizovan kruжок po izučeniю esperanto. Eŝe ĵila naĵeĵda, ĉto vsemirna revolucioj vse ĵke vostorĵestvuet, i tōgda ponadobit'sja dlia obŝena s proletariami drugih stran etot iskusstvenno sozdannij jazyk. https://tverlife.ru/news/v-kalinine-byl-otkryt-pamyatnik-ivanu-andreevichu-krylovu.html

Mallonga, sed iom fuŝa skizo pri interlingvistiko

https://www.maximonline.ru/longreads/get-smart/ article/iskusvennyi-vazyk/

La samo okazis en la Kabardija-Balkaria universitato en Nalĉik – ĉi tie en la jubilea aranĝo Puŝkin sonis en la 15-lingvoj, inkluzive Esperanton, pri kio informis kelkaj lokaj amaskomunikiloj: http://kbrria.ru/kultura/v-kbgu-pushkin-zvuchal-na-15-jazykah-30225, https://news.yandex.ru/yandsearch/?lr=213&cl4url=https%3A%2F%2Fkbpravda.ru%2Fnode%2F1677&from=search ... Ĉi-foje la vorto "Esperanto" ne trafis al la titolo, sed la fakto estis menciita.

Ankaŭ en Odeso okazis simila afero: http://www.odessapost.com/v-odesse-sostoialis-tradicionnye-pushkinskie-chtenija/

Do, ni sicere danku al Aleksandr Sergejeviĉ pro lia kontribuo al kreo de pozitiva bildo pri Esperanto ĉe ĵurnalistoj!

Ni renkontiĝos en Esperanto-lando

En la elektronika versio de la ĵurnalo "Divja" (Региональный информационный еженедельник. Распространяется на территории Тихвинского, Бокситогорского районов, г. Пикалево Ленинградской области) aperis amkleksa artikolo de Aleksandro Belov pri Tiĥvinaj Esperanto-Metejoj (TEMoj-2019):

Tihvin on-line https://tihvin.spb.ru/40956/40960/ https://vk.com/doc183376618_513679377?hash=04700c6e32..

Legu kaj reĝu!



La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperanto-Sprache. Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Herstreben unter der Leitung des Dr. Esperanto (Dr. L. Zamenhof), Vorstand des Welt-espérantisten-Vereins.

Resolviĝi unuaklele alian. Hieraŭ nuna ĵurno en la mondo.

Pro 1 Mark für die Vierteljahrshefte des Preis 135 Mk. Ĵurnaloj estas akceptitaj per 30 ĵurnaloj por la ĵurnalo.

La ĵurnalo estas akceptitaj per 30 ĵurnaloj por la ĵurnalo.

La ĵurnalo estas akceptitaj per 30 ĵurnaloj por la ĵurnalo.

La ĵurnalo estas akceptitaj per 30 ĵurnaloj por la ĵurnalo.

La ĵurnalo estas akceptitaj per 30 ĵurnaloj por la ĵurnalo.

La ĵurnalo estas akceptitaj per 30 ĵurnaloj por la ĵurnalo.

La ĵurnalo estas akceptitaj per 30 ĵurnaloj por la ĵurnalo.

La ĵurnalo estas akceptitaj per 30 ĵurnaloj por la ĵurnalo.

La ĵurnalo estas akceptitaj per 30 ĵurnaloj por la ĵurnalo.

La ĵurnalo estas akceptitaj per 30 ĵurnaloj por la ĵurnalo.

"La Esperantisto" 130-jara!

La unua Esperanta gazeto estis "La Esperantisto" – gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto. Ĝia okpaĝa proĵnumero aperis la 1an de septembro 1889 en la germana urbo Nurenbergo (Nürnberg) kaj havis publikaĵojn en la germana, franca lingvoj kaj en Esperanto. La gazeton eldonis Christian Schmidt (Kristian Ŝmit), kiu estis prezidanto de la mondlingva societo en Nurenbergo. En 1888 la societo laŭ lia propono forlasis la planlingvon Volapuko kaj aliĝis al Esperanto. "La Esperantiston" redaktis Ludoviko Zamenhof kaj finance subtenis germana esperantisto-mecenato W. H. Trompeter. Fine de 1889 la gazeto havis jam 113 abonantojn, plejparte el Rusio. "La Esperantisto" tuj fariĝis populara organo, unuiganta diverslandajn esperantistojn, kiuj antaŭ 1889 povis nur private korespondi kun la Majstro. La gazeto aperigis diversetajn tekstojn kaj lingvajn respondojn de doktoro Zamenhof, informadis pri la progreso de Esperanto, kuraĝigis pionirojn de la Esperanto-movado. En 1889 Ludoviko Zamohof havis 30 jarojn, la internacia lingvo Esperanto aĝis nur 2 jarojn.

Sed komence de 1895 en la literatura parto de "La Esperantisto" estis publikigita traduko de la artikolo de Leo Tolstoj "Prudento kaj kredo". Pro tio la cenzuro malpermesis la eniradon de la revuo en Rusion, kie ĝi havis la plej grandan parton de siaj abonantoj, kaj tio malebligis ĝian pluan eldonadon. En 1894 "La Esperantiston" abonadis 717 personoj, el kiuj 60% estis rusianoj. Aŭguste de 1895 aperis la lasta kajo de la gazeto. Entute dum ses jaroj estis eldonitaj 66 numeroj.

Vladimir Opletajev (Surguto)

Andreo Ĉe (1895 – 1979)

Antaŭ 124 jaroj la 12-an de septembro 1895 en Rumanio en la ubeto en Marosludas naskiĝis Andreo Cseh – unu el neordinaraj personoj en la historio de la tutmonda esperantista movado. Li estis rumana hungaro. En 1919 li pastrigis kaj servis kiel katolika pastro. Cseh lernis Esperanton en 1910. Sian unuan Esperanto-kurson li gvidis en la rumania ubo Sibiu en 1920 por diversnacia societo de laboristoj. La kurso rezultis tre sukcesa, kaj ĉi tiun jaron oni konsideras naskiĝjaro de la originala Cseh-kursmetodo. Ekde tiu tempo li gvidis multajn kursojn de Esperanto en diversaj urboj de Rumanio. En 1924 lia episkopo grafo Gusztáv Károly Mailáth donis al li libertempon por tute dediĉi sin al la disvastigo de Esperanto. En ĉi tiu jaro komenciĝis liaj sukcesaj propagandaj vojaĝoj tra pluraj landoj de Eŭropo. En 1929 en Budapeŝto Andreo Cseh okazigis sian unuan internacian pedagogian kurson. En aprilo 1929 aperis la unua eldono de la kurso de Andreo Cseh, stenografita en Stokholmo kaj eldonita de Sveda instruista Esperanto-federacio. En 1930 Cseh ekloĝis en Nederlando. Post la okazigo de kelkaj internaciaj pedagogiaj seminarioj la 24an de majo 1930 Cseh fondis kun gesinjoroj Julia C. kaj Jan R.G. Isbrücker la Internacian Cseh-Instituton de Esperanto – sendependan kulturalan fondajon sen profita celo kun la sidejo en Hago. Poste la nomo ŝanĝiĝis je Internacia Esperanto-Instituto. En 1932 li estis fondinto kaj ĉefredaktoro de la gazeto “La Praktiko”, kiu aperadis ĝis 1970 (en la lastaj jaroj prizorgata de UEA de 1964). Pri la ekskluziva signifo de propagandaj turneoj kaj popularaj kursoj de Cseh en multaj eŭropaj urboj Julia Isbrücker skribis: “Liaj kursoj havis ĉie eksterordinaran sukceson, tiel, ke la Esperantaj gazetoj parolis pri la renesanco de Esperanto”.

Krom la tutviva aktivado sur la instruista kampo Andreo Cseh elstaris ankaŭ kiel movada organizanto kaj gvidanto. Ekzemple, en 1942, dum la germana okupado de Nederlando, en sekreta kunveno estis fondita Universala Ligo, kies iniciatintoj kaj multjaraj gvidantoj estis li kaj Julia Isbrücker.

Andreo Cseh forpasis 9an de marto 1979 en la aĝo de 83 jaroj. Li estis entombigita en la Kapelo ĉe la romkatolika enterigejo de Hago. Sur la kapela marmora memortabulo estas gravurita lia nomo: "Andreo G.J. Cseh, prof. Linguae Esperanto". En 2019 estas 40-jara mortodatreveno de unu el la plej famaj kaj elstaraj perantoj kaj disvastigantoj de Esperanto.

Preface al la tria eldono de sia kurso en 1947 Andreo Cseh turnis sin al kursgvidantoj per kuraĝigaj vortoj: “En la kurso la plej grava estas la persono de la instruisto. Li povas sukcesigi la plej malbonan metodon kaj povas detrui la plej bonan. Tial klopodu regi vin kaj vian laboron kaj fariĝi majstro en via fako. Vivigu vian tutan laboron amo al Esperanto kaj amo al viaj lernantoj. Tiam vi brile sukcesos.” Kiel emfazas Ed Borsboom, aŭtoro de la libro “Vivo de Andreo Cseh” (Internacia Esperanto-Instituto, 2003), “Cseh havis magian ĥarismion, li kvazaŭ lude instruis, sorĉis per anekdotoj kaj kapablis sen streĉo entuziasmigi homojn per kaj por Esperanto”. Post dudek lecionoj duhoraj povis lernantoj de Andreo Cseh konversacii en Esperanto.

La bazaj principoj de lia kursmetodo ne abundas, sed ili postulas tre majstran kaj streĉan laboron de Ĉe-metoda instruisto:

- a) neuzado de lernolibroj;
- b) neuzado de nacia lingvo, sed klarigo de la novaj vortoj per la jam instruitaj kaj per objektoj kaj gestoj (Prefere la kurso estu gvidata de fremdlingva instruisto, por efike plenumi punkton b);
- c) komuna ĥora respondado de la kursanoj;
- ĉ) aplikado de konversacio pri aktualaĵoj anstataŭ uzado de lernejecaj ekzemploj;
- d) riĉa aplikado de humuro kaj ŝerco;
- e) instigo al tio, ke la lernantoj mem eltrovu la regulojn de la lingvo kaj ke ili mem konstruu la gramatikan sistemon.

Milojn da lernantoj havis Andreo Cseh, centoj da instruistoj iĝis lertaj adeptoj de lia kursmetodo, kaj tio estas majesta monumento, kiu poreterne gloras lian nomon en la historio de la esperantista movado.

Vladimir Opletajev

UEA informas

12 ELSTARAJ AGANTOJ PREMIITAJ EN LAHTIO

En la Solena Fermo de la 104-a Universala Kongreso en Lahtio estis anoncigitaj la nomoj de 12 ricevantoj de Diplomo pri Elstara Agado kaj de Diplomo pri Elstara Arta Agado. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007.

Diplomo pri Elstara Agado:

Wolfram Diestel (Germanio) pro la elstara agado kiel fondinto kaj prizorganto de la Reta Vortaro (**ReVo**), kiu festas ĉi-jare sian 20-jariĝon.

Andrej Grigorjevskij (Rusio) pro la longdaŭra elstara agado kiel volontula prizorganto kaj restro de la retejo de UEA.

Vasil Kadifeli (Turkio) pro la elstara agado kiel instruisto, tradukanto kaj redaktoro de la turka revuo **Turka Stelo**. Li estas unu el la motoroj de la Mezorianta kaj Nordafrika Komisiono de UEA (MONA), regule funkcia. Li aperigas proksimume unu komunikon semajne, jam de almenaŭ du jaroj. Li aperigas ankaŭ valorajn literaturajn verkojn el la araba kaj turka kulturoj.

Reza Kheir-khah (Tajvano) pro la longtempa elstara agado kiel instruisto de Esperanto por la tajvana movado kaj eldonisto de la revuo "Formoza Folio".



Malgosia Komarnicka (Pollando) pro la elstara agado kiel organizanto de kulturaj kaj klerigaj aranĝoj en Pollando, kiel la Interkultura Majrendevuo, la Eŭropa [Festivalo](#) de Esperantaj Kantoj.

Lu Wunsch-Rolshoven (Germanio) pro la elstara agado kiel informanto pri Esperanto. Li estas la fondinto kaj la estro de EsperantoLand kaj prizorgas la gazetarajn rilatojn de Germana Esperanto-Asocio.

Privas Tchikpe (Benino) pro la elstara agado kiel prezidanto de la asocio "Scio Sen Bariloj" kaj la provoj mediicii en konfliktaj situacioj kaj kunlaborigi ĉiujn beninajn aktivulojn por Esperanto.

Bernhard Tuider (Aŭstrio), bibliotekisto, pro la elstara agado kiel prizorganto de la [Kolekto](#) por Planlingvoj ĉe la Aŭstra Nacia Biblioteko kaj [Esperanto-Muzeo](#) en Vieno.

Wei Yubin (Jado) (Ĉinio) pro la elstara agado kiel direktoro de elementa lernejo kun 7 Esperanto-instruistoj. Li enkondukis Esperanton en sian lernejon antaŭ 10 jaroj; ĝis nun pli ol 600 lernantoj lernis Esperanton; ĉiujare oni okazigas Zamenhof-feston en la lernejo.

Diplomo pri Elstara Arta Agado:

Jo Haazen (Rusio) pro la senlaca agado arta kaj movada, inkluzive de la orkestra realigo de "La Espero".

Miroslav Malovec (Ĉeĥio) pro la elstara kontribuo al la muzika Esperanto-kulturo, per la traduko de la opero [Sternhoch](#) (teksto de Ivan Acher laŭ la ekspresionisma romano de la ĉeĥa aŭtoro Vladislav Klíma), surscenigita de la Nacia Teatro en Prago.

Antonio de Salvo (Italio) pro la elstara kontribuo al la literatura Esperanto-kulturo. Li tre regule publikigas sur retaj listoj informojn pri italaj verkistoj kaj pri famaj aŭ konindaj homoj. Li kreis kaj prizorgas ampleksan blogon en la bitoteko de Itala Esperanto-Federacio (www.bitoteko.it).

Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 816 2019-07-29

UEA ENGAĜIĜAS POR PLURLINGVECO EN SCIENCA KOMUNIKADO

UEA bonvenigas kaj subtenas la Helsinki-iniciaton por plurlingveco en la scienca komunikado, kiu pledas por lingva diverseco en gravaj terenoj de scienca agado:

- Disvastigo de esplorrezultoj
- Nacia kaj nacilingva publikigo de loka esplorado
- Pritraktado kaj sponsorado de esplorado

Aparte UEA rekonas la gravecon de plurlingva interkomunikado en scienca esplorado kaj kunlaboro, kun diverslingva diskonigado de sciencaj rezultoj.

Tion UEA konsideras esenca por malaltigi la lingvajn barojn kaj mildigi la lingvan diskriminacion kontraŭ sciencistoj kaj esploristoj, kiuj ne sufiĉe bone regas la anglan lingvon, en kiu nuntempe okazas la plejmulto de la internacia scienca aktiveco kiel kunvenoj kaj ĵurnaloj.

UEA fieras pri sia propra ekzemplo de plurlingveca scienca publikado kadre de la Internacia Kongresa Universitato, kiu jam pli ol dudek jarojn disponigas altkvalitajn sciencajn tekstojn en la formo de IKU-libro, regule aperanta en la Universala Kongreso, kun resumoj en kvar aŭ kvin lingvoj (<https://uea.org/teko/IKU>).

Krome menciindas la plurlingveca scienca eldonado de du Fakaj Asocioj: UMEA, kies organo, Medicina Internacia Revuo, aperigas artikolojn en pluraj lingvoj, kun resumoj en la angla kaj Esperanto, kaj ISAE, en kies longtempa Scienca Revuo aperas sciencaj artikoloj, kutime en Esperanto. Alia plurlingva scienca organizaĵo, kiu rilatas al Esperanto estas Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), kiu okazigas universitatajn studsesiojn en pluraj lingvoj, ofte en Esperanto. Jam 25 jarojn, kunlabore kun UEA, ĝi aŭspicias la komunajn IKU-AIS sesiojn dum la UK.

Gravas en tiu kunteksto ankaŭ la subteno de Esperanto Studies Fonduso (ESF), kiu stipendias plurlingvajn sciencajn iniciatojn, kiel la interlingvistikaj kursoj de Poznano. Institucioj kiel la Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Biblioteko en Vieno kaj la Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko (STEB) havas grandajn kolektojn de sciencaj kaj alitemaj tekstoj en pluraj lingvoj, grandparte en aŭ rilataj al Esperanto.

UEA proponas al siaj kunlaborantoj, aktivuloj kaj membroj, aparte al tiuj, kiuj rilatas al sciencaj, edukaj kaj lingvaj temoj, legi la alvokon ĉe <https://www.helsinki-initiative.org/eo> kaj subskribi ĝin ĉe <https://www.helsinki-initiative.org/eo/sign>

Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 819 2019-08-24


LA UNUAN FOJON UNESKO UZOS ESPERANTON EN FESTIVALO

La 19an de septembro 2020 (post unu jaro) Unesko okazigos festivalon por la paco en Tolosa (Hispanio). La laborlingvoj de tiu ĉi festivalo estas la franca, la angla, la hispana kaj Esperanto. La festivalo konsistos grandparte el filmetoj de kiel eble plej da korusoj tra la mondo kantantaj por la paco en plej diversaj lingvoj, sed la tekstoj de la kantoj devos esti tradukitaj al unu el la kvar laborlingvoj: franca, angla, hispana aŭ Esperanto.

UEA rigardas la festivalon kiel gravan ŝancon por kontribui en la realigo de la celoj de UN, kaj por vidigi al la publiko la valoron de la internacia lingvo Esperanto. Ju pli da korusoj estos rekomenditaj de esperantistoj, des pli videblas al la publiko utileco de Esperanto kaj vasteco de la naciecoj de la esperantistoj. UEA alvokas, ke landaj asocioj, lokaj grupoj kaj aktivuloj rekomendu korusojn, esperante ke ĉiu lando rekomendos almenaŭ unu koruson.

Se vi konas koruson, kiu povus realigi tian 3-minutan filmeton de kanto por la paco, en iu ajn lingvo (kun traduko de la teksto al Esperanto) aŭ rekte en Esperanto, kontaktu François Lo Jacomo <francois@lojacomo.eu>, reprezentanto de UEA ĉe Unesko, kaj Trezoro Huang Yinbao <trezoro@qq.com>, vicprezidanto de UEA, respondeca pri la rilatoj kun Unesko.

Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 820 2019-08-25



VOLGIA ESPERANTO-RENKONTIĜO – 16

Dato: – 02 -04.11.2019

Loko: – urbo Samara, hoteleto "Time" ("Tempo"), str. 3-ja Proseka, 63. Kvaretaĝa aparte situanta domo sen lifto.

Atingeblecoj: de la fervoja stacidomo prenu la buson numero 50, de la busa stacio funkcias mikrobuso numero 21. La haltejo nomiĝas «DK Sovremennik».

En la hoteleto estas strikte malpermesata uzo de alkoholo kaj fumado. Fotojn eblas vidi chi tie: www.time163.ru

Prezo por loĝado:

350 rbl/persono/nokto en 10-lita ĉambro;

1000 rbl/persono/nokto en la ĉambro kun 3 dormolokoj;

1300 rbl/persono/nokto en la ĉambro kun 2 dormolokoj.

Mangheblecoj: memstare en la kafejo (en la sama domo), apudas loka manĝejo je 10-minuta distanco de pieda promeno.

Programo antaŭvidas diversajn prelegojn, viziton de la urbo «Samara en literaturo kaj filmoj», Esperanto-kurseton por novuloj kaj trejnadon por progresantoj, vesperajn ludojn, partoprenon en la Samara Arta Nokto, koncertojn, diskutadon kaj multon alian, kio dependas ne nur de la mastroj, sed ankaŭ de la gastoj.

Aliĝkoto: 300 rubloj. Por REU-membroj estas 100-rubla rabato. Infanoj ĝis 16 aĝo kotizon ne pagas. Viaj aliĝiloj kaj kotizo estas atendataj al la 31 de oktobro 2019. Bonvolu sendi monon al la sberbanka karto 2202 2004 4202 3485 Olga Mihajlovna A.

Aliĝilojn bv sendi al Elena Kuznecova espersam@yandex.ru, telefonnumero jenas: 89967323346. Ĉiujn demandojn kaj klarigojn bonvolu ricevi de ŝi.

Bonvenon al VER-16!!!

NOVOJARSK-2020

Karaj amikoj, kun ĝojo ni informas vin, ke novan 2020 jaron ni invitas renkonti en Barnaulo – la ĉefurbo de Altaja regiono. Vin atendas varma kompanio, riĉa, tamen ripoza programo kun novjara festeno, variaj aranĝoj, promenoj, ekskursoj en olda, sed juna Barnaulo.

Datoj:

31.12.2019 - 5.01.2020

Loĝado:

Ni trovis agrablan hostelon (t.e. hoteleton / junlurgastejon) en la centro de la urbo, kio estas evidenta avantaĝo. Ĝi nomiĝas "Raduga" kaj situas laŭ adreso: str. Krupskoj, 103a. La kosto de loĝado estas 400 rub./diurno.

En la hostelo troviĝas 2 ĉambroj 8-lokaj (po 4 "duetaĝaj" litoj), 2 ĉambroj 4-lokaj (po 2 "duetaĝaj" litoj), 1 ĉambro 2-loka (2 apartaj litoj), 1 ĉambro {1+1}-loka (1 dupersona lito (taŭgas ekz. por geedzoj). Do, se vi venas pare kaj deziras loĝi en aparta ĉambro (unu el du lastaj variantoj), bv. indiki tion en la letero, konfirmanta sendon de la kotizo, al don_ikar@mail.ru. Du lastaj variantoj jam estas rezervitaj fare de la plej aktivaj aliĝintoj, do ne plu estas elekteblaj.

Manĝado:

Varianto 1: 3-foja/tage manĝado en la manĝejo de la hostelo - 350 rub./tage.

Varianto 2: Eblas zorgi pri sia manĝado memstare. En la hostelo troviĝas moderna kuirejo kun ĉio necesa: mikroondilo, fornelo, malvarmigilo, te-kaldrono ktp. Sufiĉe proksime al la hostelo troviĝas komunmanĝejo, kafejo kaj picejo, ankaŭ magazenoj ĉeestas.

Novjara festo:

La bankedo estos organizita kun helpo de la posedantoj de la hostelo (t.e. la manĝaĵojn preparos iliaj kuiristoj). La kosto: 800 rub./persono. Sen alkoholo (dezirantoj zorgu memstare). Se la partoprenantoj de la Novjara renkontiĝo malmultos, la posedantoj de la loko povas akcepti aliajn gastojn paralele kun ni.

Programo:

Estas pridiskutata. Ni akre bezonas viajn proponojn!

Programeroj estos aranĝitaj en la granda manĝejo (la bankeda halo, kiu eĉ havas malgrandan scenejon) de la hostelo. Tamen, ni ne havos la halon en nia plena dispono tutdiurne - necesas indiki la horojn! Do, anticipu preparita programo estas bezonata ankaŭ pro ĉi tiu kialo.

Ekskursoj:

- muzeo de la dua en la mondo kosmonaŭto German Titov. Lia patro, S. P. Titov, estis esperantisto, kaj en la muzeo funkcias aparta ekspozicio, dediĉita al li. 200 rub. –muzeo de kosmonaŭtiko + domo-muzeo de familio Titov, + 200 rub. – luado de buso.
- Altaja regionografia muzeo. Senpage.
- Aliaj ekskursoj estas pridiskutataj.

Pagoj:

Aliĝkoto ĝis 30.11.2019 estas 500 rub. (por la tuta periodo); poste/surloke kaj por neplena periodo: 100 rub./diurne.

Aliĝkoto ordinare ne redoneblas, des pli, kiam elspezoj por organizado de la aranĝo estis faritaj, tamen O.K. pretas konsideri neatenditaĵojn.

Por studentoj validas 50% rabato de la aliĝkoto. Por lernejoj kaj pli junaj infanoj la aliĝkoto estas nula, kondiĉe ke ili parolas Esperanton. (Tamen ne forgesu pri kosto de manĝado, ekskursoj ktp, kiuj plu restas pagendaj.)

Aliĝo validas nur post via pago de la kotizo!!!

Granda peto: laŭeble sendi monon ne nur por la kotizo kaj la bankedo, sed ankaŭ (laŭeble) por la loĝado en la hostelo, pagendaj ekskursoj (se vi partoprenos) k.a., ĉar ĉi tiu mono estos uzata por la antaŭmendoj. (Certe, se vi havas problemon sendi tuj la plenan sumon - skribu al O.K., ni penos solvi la situacion.)



La 1-an de decembro ni devos konfirmi kvanton de loĝantoj en la hostelo kaj antaŭmendi buson al la muzeo de Titov. Do, rapidu aliĝi kaj kotizi ĝis tiu dato!

En la konfirmanta letero skribu: "Mi sendis 500+800+xxx rub. (kotizo + bankedo + io alia)".

La monon bonvolu sendi SEN KOMENTOJ EN LA MESAĜ-KAMPO al Sberbanka karto: 5336 6900 8897 9861

Игорь Анатольевич Акименко

NEPRE konfirmu sendadon de la mono per ret-mesaĝo al don_ikar@mail.ru

Sen tiu mesaĝo, la mono uzitos por komunaj aferoj.

Aliĝi eblas ĉe <https://www.ural-sib.org/eo/novojarsk-2020#aliĝilo282>

Transporto:

Kiel alveni Barnaulon:

Aviadile: Elektu flughavenon "аэропорт Барнаул (BAX)". Ekzistas rektaj flugoj el Moskvo, Sankt-Peterburgo, Irkutsko, Tomsko, Kazano, Krasnojarsko, Surguto, Simferopolo, Soĉio, Anapo, Karmanjo, Antaljo. La retejo de la flughaveno: www.airaltay.ru. Eblas trovi plej malmultekostajn biletojn per Skyscanner.

Trajne: Ekzistas trajnoj el Moskvo, Novosibirsko, Bijsko, Samaro, Abakano, Krasnodaro, Tjumeno, Slavgorodo, Almato. El aliaj urboj eblas veni Barnaulon per alkrōĉita varono aŭ ŝanĝante la trajnon en Novosibirsko. Spekti la horaron kaj aĉeti biletojn eblas ĉe tutu.ru aŭ www.rzd.ru

Buse: El proksimaj regionoj eblas atingi Barnaulon ankaŭ buse. La horaron eblas trovi en www.avtovokzal.ru, www.e-traffic.ru, sibirinfo.ru

Kontaktoj:

Ikar': telefono+WhatsApp+Telegram: +79069465040, E-mail: don_ikar@mail.ru

Alona: telefono+WhatsApp: +79132712338

La plej freŝajn novaĵojn pri Novojarsk-2020 vi povas vidi en nia grupo en VK <https://vk.com/novojarsk2020>

Alvokoj

14-a Moskva Lingva Festivalo

Saluton al ĉiuj lingvoŝatantoj!

MEA MASI kaj la teamo de la Moskva Lingva Festivalo kun kontento kaj ĝojo informas, ke la 1-an de decembro 2019 ni renkontiĝas kun vi jam la 14-an fojon! Kaj denove nin akceptas la plej prestiĝa kaj la plej amikema al ni lingvafestivalejo de Moskvo – la fakultato de neprecizaj sciencoj de la Nacia esplora universitato "Supera lernejo de ekonomiko". Kaj, kiel ĉiam, tiu tago estos nia plej bona tago en la jaro! Estas invitataj ĉiuj!

Venu tiun dimanĉon al la 11-a horo por Solena Malfermo!

La adreso: Москва, НИУ ВШЭ, ул. Старая Басманная, д. 21/4.

Eble, vi scias, kiel plej freŝe, interese kaj alloge prezenti Esperanton? Eble, vi deziras prezenti iun alian lingvon? Eble, vi konas interesan lingvoprezentanton? Viajn proponojn por la programo sendu al la direktoro de MLF **Irina Gonĉarova**: mirinda.strigo@gmail.com



Anoncoj

Akiru utilajn librojn!

Rusa-Esperanta vortaro de Je. Bokarev

En Uljanovsko estas grandega stoko de rus-esperantaj vortaroj de Je. Bokarev.

Ili estas liverataj senpage al vi, viaj kluboj, por kursoj, por komencantoj, bibliotekoj, ktp.

La kondiĉo estas unusola: poshtelspezojn bv pripagi mem.

Interesatoj turnu vin al Jurij Karcev:

yuka@yandex.ru

Esperanto dum 10 horoj de B. Kolker

Por akiri la libron turnu vin al Svetlana Smetanina (svsmetanina@yandex.ru), la prezo de unu ekzemplero estas nur 50 rubloj.

Plenumantoj de specialaj projektoj (prelegoj pri la lingvo en specialaj aŭditorioj, prezentoj de Esperanto dum lingvaj festivaloj ks.) povos ricevi laŭ interkonsento certan kvanton da broŝuroj senpage – kiel materian kontribuon por konkreta projekto.



"Ponto" [Bulteno de REU (BdR)] estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo

"RUSIA ESPERANTISTA UNIO"

La revuon aŭtomate ricevas ĉiuj membroj de REU, ĉiuj ceteraj povas aboni ĝin ĉe la Estraro.

"Ponto" atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio